

HISPANA ESPERANTO

Ilustrita ĉiumonata gazeto, por la propagando de Esperanto kaj diskonigo de la Historio, Arto, Literaturo, folkloro kaj naturaj belaĵoj, de nia lando.—Redakcio: JACA, provinco de Huesca.—Julio Mangada Rosenörn

III^a
JARO

NUM. XI.—NOVEMBRO

1930



Komercaĵborso.

LA POEZIO ĈE LA HISPANAJ ARABOJ
KAJ
ĜIA INFLUO EN LA KRISTAN-HISPANAN KAJ EN TIUJN
DE ALIAJ SUDAJ POPOLOJ

(*Daŭrigo*)

La veziro *Hazm-Ybn Jehvar* dediĉis al la dezerta palaco de Kordobo la jenan versaĵon, el kiu ankaŭ la hispanan tradukon oni donas:

Tus salas y desiertas galerías
mis ojos contemplaban,
y pregunté: ¿Dó están los que otros días
en tu seno moraban?
En mi seno, dijiste, breve ha sido,
muy breve su vivir.
Ya se ausentaron; pero ¿dónde han ido?
No lo puedo decir.

.....

Mi galeriojn, ĉambrojn, plendezertajn,
la ciajn, mirrigardis;
mi min demandis: kie trovi spertajn
loĝintojn, kiuj ardis?
Ĉe mi mallonga estis ja-ci diris-
restado la ilia.
Ili forestas, jes; sed kien iris?
Respondo; vel, nenia.

Dum la regado de *Abderrahmen I^a*, (755-788) brilis la poeto *Abulmajxi*, kiu mirinde verkis pri sia blindeco, ĉar la princo *Suleiman*, fanatika partiano de la princo *Hixem*, opinante versaĵon de la poeto ofendanta *Hixem*, ordonis eltiri la okulojn al la poeto. Jen hispana traduko de Valera el iu el liaj verkaĵoj kaj la esperanta:

La madre de mis hijos abrumada
por el dolor está
porque mis ojos con su diestra airada
ha fulminado Alá.

Ciego me ve seguir la esposa mía
esta mortal carrera,
hasta que al borde de la tumba fría
con el báculo hiera.

Y la infeliz postrada por el suelo
exclama: «¡Oh, suerte! ¡Oh, suerte!
¡No aumentarás tan espantoso duelo
ni con la misma muerte!»

Y abre en mi corazón profunda llaga
diciendo: «No hay pesar
como no ver la luz, que ya se apaga
en tu dulce mirar.»

.....

Jen patrino de miaj filoj vundata
de dolorego ja
ĉar okulojn miajn, man' ĉagrenata
ĵus tiris. Ve, Ala!

Min edzino vidas sekvi la vojon
tutblinde jam, la mian,
ve! ĝis kiam mi do falos, mortfojon,
en tombon tre glacian.

Kaj ŝi, genuiĝante sur pavimon,
ekkrias: «Ho, ve sorto,
al mia la doloro ne la limon
alportos eĉ la mortoj»

Jen korvundo mia kiam ŝi diras:
«Senlumo de l' rigard'
cia, iam dolĉa, koron disŝiras.
Kruelo de l' hazard'!»

Almotamid (1040-1095), pri kiu jam oni parolis, estas
unu el plej admirindaj arabaj poetoj, kaj el liaj versaĵoj estas

unu el plej elegantaj kaj citindaj la jena, kiun hispane tradukis Varela:

Lejos de tí, penando de contino,
infortunios recelo;
ebrio me siento, pero no de vino,
sino de triste y amoroso anhelo.

Ceñir quieren mis brazos tu cintura,
y mis labios besar tus labios rojos;
hasta gozar de nuevo tu hermosura,
han jurado mis ojos
del sueño no rendirse a la dulzura.

Vuélvete, dueño amado;
sólo volverme así la dicha puedes,
que está mi corazón aprisionado
para siempre en tus redes.

.....

For de ci, jen la malĝojo sen fino,
malfeliĉoj min tiras;
mi ebria sentas min, ne pro l' vino,
sed ĉar amdeziro koron disŝiras.

Cin brakpremi estas mia la celo;
kisi ĉiajn lipojn, mia plezuro;
ĝis reĝuu mi pro ĉia la belo,
de l' okuloj jen juro:
ne fermiĝi dum briladu la stelo.
Karulino, revenu;
rehavigu al mi ĝojon, jen petoj,
por ke mian koron ĉiam retenu
ĉiaj ravaj amretoj.

Kaj la poeto, sin sentante morti, perdinte la esperon eliri el la malliberejo, verkis veran klasikan romancon, el kiu jen hispane kaj esperante tradukitaj fragmentoj:

Con mi vida el infortunio
se ha ligado para siempre.
¡Oh, palacio de Az-Zahi!
¡Oh, fastuosos banquetes!

¡Cuando en mi mesa solían
tomar asiento los Reyes!...
Así el placer y el dolor,
así los males y bienes,
la tela de nuestra vida
con varios colores tejen,
hasta que corta la tela
y la esperanza la Muerte.

.....


Malbonsort' kun mia vivo
kunligiĝis jam por ĉiam
Ho, palac' de Az-Zahi'!
Ho, festenoj ambroziaj!
Kiujn partoprenis Reĝoj
iam ĉe l' manĝtablo mia!...
Tiél ĝojo kaj doloro,
bono kaj la malo, ĉiaj,
teksas tolon de la vivo
kun koloroj tre variaj,
ĝis fatale tondas tolon
kaj esperon Morto iam!

(Daŭrigota.)

ATENTU!

Por la statistiko, kiun ni faras por IALA (International Auxiliary Language Association in the United States Inc.), New York, rilate la esperantistan instruistaron kaj rilate la temon «Esperanto en lernejoj», ni nepre bezonas ankoraŭ specialan materialon laŭ decido de IALA. Estas necese, konstati, en kiuj lernejoj de la mondo dum la tempo de la lasta kvaronjaro 1.X.-31.XII. 1930 Esperanto estas instruata en lernejoj.

Ni tre kore petas, ke ĉiuj gekolegoj, kiuj dum ĉi tiu tempo instruas Esperanton en siaj lernejoj, sciigu nin pri tio. Ili estas petataj:



- 1.) doni sciigojn pri la koncerna lernejo, sciigante ĝian nomon en sia nacia lingvo (per latinaj literoj) kaj samtempe doni la nomon kaj la gradon en Esperanto.
- 2.) doni sian precizan propran adreson kaj,
- 3.) aldoni notojn, Kiuj ŝajnas necesaj por klarigi la situacion.

(Ekzemplo:

- al 1.) 5. Gemeindeschule Berlín S.13, Blumenstrasse 49 (unuagrada popollernejo).
- al 2.) Hans Feieracend, Volksschullehrer (popollerneja instruisto), Berlín W. 35, Poststrasse 92, II.
- al 3.) 2 horojn po semajne, nedevige, por 12-jaraj knaboj de la 6-a lernojaro.)

Estas tre grave, ke ni povu liveri kiel eble plej kompletan materialon, grave por nia kunlaborado kun IALA kaj same grave por nia Esperanto-propagando.

La rezulton ni transdonos al nia Esperanto-gazetaro.

«Kunlaborado de IALA en New York kaj de la Instituto J. J. Rousseau en Geneve kun la Esperanto-Instituto por la Germana Respubliko en Leipzig».

D.ro Dietterle

NB. Bonvolu sendi la materialon—*plej malfrue ĝis fino de l' jaro 1930*,—al la sekretariino de «Kunlaborado»: fino Martha Moelke.—Brandenburgische Strasse 5,I.—*Berlin-Siidente* (Germanujo)

AL LA MEMBROJ DE H. E. A.

Estas de antaŭlonge mia celo, ke nia tutlanda organizaĵo havu propran gazeton senpagan por siaj membroj iam, kaj dume liveri al ĝi iel utilan oficialan organon sen elspezo ĝia aŭ kiel eble plej malmultekoste: tiel mi nur celis la bonon kaj sukceson de H. E. A., kaj tute klare vidigas la rezultato atingita de mia celado, de la fondo de ĉi gazeto ĝis nun. Mi diverse foje konstatis kaj hodiaŭ rekonstatas, ke mi estas ĉiam preta cedi ĉiajn miajn rajtojn al H. E. A., kiu povos estri la gazeton laŭ decido de la Komitato, nomante Komitaton el redaktoroj, kiuj elektos el si mem sian direktoron, kaj por tiu Komitato mi plengoje kaj plenkonscie proponas F-inon. Amalia Nuñez Dubus (telegrafistino kaj profesorino en la Normala Lernejo de Pamplona), S-ron. Ferdinando Redondo (Staba Subkolonelo en Palma de Mallorca), S-ron. Ferdinando Soler (Telegrafestro en Badajoz), S-ron Jozefo Anglada (Komerca Profe-

soro en Barcelona). S-ron. Ludoviko Rodríguez Escartin (Oficisto de la Norda Fervojkompanio en Madrid), ĉiuj estas tre kompetentaj malnovaj entuziasmaj samideanoj kaj lojalaj al H. E. A. formontaj spertan redaktoraron.

Mi atentigas vin, ke la gazeto aperas dulingve, kontraŭ mia opinio, pro komplezo al opinio ies; ke, pro ties opinio, aperas hispane la informado pri fremdlandoj, kun la celo faciligi elĉerpado por hispanaj ĵurnaloj kaj gazetoj kaj ke neesperantistoj povu rekte informiĝi pri progreso kaj sukcesoj de Esperanto.

Mi konstatas, ke mi rifuzis kunlaboradon ies, ĉar multaj samideanoj konscias sin verkistoj de la esperanta lingvo kvankam en patra lingvo ili neniam verkis artikoleton, kaj mi bone spertis pri tia verkemo dum ses jaroj, per «Hispana Esperantisto»; sed mi ne rifuzis originalojn, tradukaĵojn, de kompetentaj samideanoj; kaj mi bedaŭras ne estu alvenintaj al mi pli da verkaĵoj, ĉar tio devigis min al plej granda laboro, kaj se publikigindaj tekstoj estus trafintaj min, *mi ne estus akaparinta la gazeton*, kiel diras tiuj, kiuj, vidas ligneron sur fremda okulo kaj ne vidas trabon blindigantan siajn, al kiuj mi rememorigas dirojn: «*mi estas la mastro de la azeno, kaj mi, tial, laŭ mia plaĉo, aŭtaŭnenigas aŭ haltigas ĝin*», kaj konsekvence mi ŝarĝis la bonan ŝarĝon, kiun havigis al mi kiu ajn kaj rifuzis ŝarĝaĉon ies, ĉar la gazeto ne povas esti *provejo*. Same estos devigata fari la Komitato estronta la gazeton.

Tial ke estas trafintaj min kvazaŭ plendantaj opinioj pri mia konduto koncerne la gazeton, mi tiel diris, kaj mi rekomendas al opiniintoj kaj opiniantoj tiaj, ke ili agu, ke ili solvu ĉi problemon de la gazeto firme por longedaŭra tempo, ne laŭ provo por unu jaro, kaj kiam ili estos farinta almenaŭ same kiel mi, tiam, per komparo de sia agado kun mia, ili prave povos opinii.

Julio Mangada Rosenörn.

=====

HISPANOJ!

Intencante viziti vian landon dum januaro kaj februaro proksimaj, mi ŝatus korespondadi kun interesemuloj por posta konatiĝo. Adreso: ERIK EKSTROM. Str. Mellandat, 14 GÖTEBORG (Svedujo)

ZARAGOZO, HEROA URBO

Multe oni verkis pri Zaragozo, pri ĝia ĉielo pura; pri la restaĵoj el pasintaj tempoj, kiujn ĝi konservas; pri ĝia graveco. Same, kiel pri tiom da aliaj urboj kaj lokoj, ŝajnas ke oni diris pri ĝi.

Tamen... poeto, eksterordinara verkisto kun tre delikata talento, kun vasta kulturo, Lucien Bertrand, facile eltrovis el la jam priparolita Zaragozo, el la troege konata Zaragozo, novan faceton, novan neantaŭviditan nuancon.

Mi vagadis melankolie tra Zaragozo, ĝis kiam mi supreniris en la monton *Torrero*.


Torrero estas sufiĉe alta monteto, kiu staras Suden kaj kiu regas la urbon. Ĝi estas la strategia ŝlosilo de la ĉefaj vojoj al la urbo. Dum la napoleonaj sieĝoj, ĉi tiu kalka altano estis apartigata el la urbo de zono konsistanta el multenombraj ĝardenoj kun villoj, kiujn ĉi tie oni nomas «*Torres*» (*Turoj*), tio estas oazaro, fruktoĝardenoj, olivejoj. Hodiaŭ *Torrero* seninterrompe estas kunigata kun la urbo per novaj kvartaloj. La monteto, kie la mariskaloj de la Imperio starigis siajn kanojnoj, estas nun stratigata, avenugata, kun promenejoj kaj ĉiaj konstruaĵoj. Mi, iom antaŭjuĝante nebone, min direktis tien. Mi pasis apud la bordoj kaj pontetoj de malnova kanalo konstruita de Karlo V^a, kaj kiun oni nomas «*Imperia kanalo*», pompa nomo ne diranta pli ol imagaĵojn saturitajn el historiaj rememoroj.

Kondukas al ĝi polvoplana ŝoseo malgaja orlata de akacioj kun malriĉa foliaro. Kiam oni alvenas al la supro de l' altano, sur elstaranta roka rando, kvazaŭ rigardejo, la urbo vidiĝas sur miriganta fono interne de kadro samtempe senfrukta kaj verdiganta kun sablaj makuloj, kies delikata koloro vidiĝas meze de bluaĵoj; orienta urbo vidiĝas. Instinkte oni serĉas la vastan fluejon de l' Ebro, ĉar Zaragozo estas unue, antaŭ ol ĉio ajn, urbo situata ĉe l' bordoj de rivero. Sed la altaj muroj de domoj kaj preĝejoj ĝin kaŝas al la rigardado. Oni divenas en malproksimen la fluon de la grandega maso el akvo tra la vicoj el boskoj pli densaj kaj la kanejaroj de ĝiaj bordoj. La speciala profilo de la urbo altiras subite la rigardon, ĝi vidiĝas kvazaŭ granda lago banka kaj malvokalora el kiu elstaras kvazaŭ pezaj

ŝipoj de la klasikaj tempoj, kun iliaj prukasteloj el oblaj etaĝoj, la pezaj ŝipoj de la malnovaj sanktejoj. Jen ĉe la centro, proksime de la bordo de l' Ebro nevidebla, la skvamozaĵaj kupoloj de l' *Pilar*, helaj, plenaj de multkolora vario sub iliaj karapacoj el azuleĥoj verdaj, flavaj kaj bluaj; malegalaj kupoloj inter du turoj graciaj kiel la persaj minaretoj. Je iom da distanco dekstren, ĉieleniras la mirinda turo de *La Seo*—la plej antikva Katedralo de Zaragozo—, sonorilejo kies ekstremaĵo bulboforma estas ruĝe pentrita, kiel ĉina ĉapelo; oriento pli azia ol afrika, kiu rememorigas la strangajn reprezentataĵojn kvazaŭ vegetarajn de la rusaj preĝejoj. Apud ĝi, jen la mirinda kupolo de la Granda Kapelo kvazaŭ kovrilo malaltigata supren de granda tamburo elstaranta de la konstruaĵo same kiel en la bizantinaj preĝejoj. Kaj tial venas en min *Sankta Sofio* kaj la malgrandaj kapeloj brilantaj, plenaj de suno, sur la ŝtondekli-vojoj de *Mistra*... Ankoraŭ pli dekstren, oni vidas la gracion maŭran sonorilejon de *Sankta Magdaleno*, kaj simetrie maldekstren, la altan okangulan de *Sankta Paŭlo* kun ĝiaj mudeĥaraj brodaĵoj romboformaj el brikoj, kun ĝia loĝio el arkadoj suben de ronda kaj akrepinta plafono, simila je tiuj de la moskeo de Tuniso. Fine, ĉe la limo de la urbo maldekstren, la grandan blankaĉan kvadratan konstruaĵon de l' *Aljaferia* (*Alĥaferia*) trafas la rigardo, ĝi estis antikva fortikaĵo kaj antikva palaco de la arabaj vicreĝoj... Ĉiuj ĉi siluetoj orientaj elvidiĝas el la ruĝa, oranĝokolora kaj kremkolora fono de la konstruaĵoj. Estas ĝi kvazaŭ vidaĵo de l' *Kairo* de la suproj de *Mokattam*, de *Estambul*, elstarante inter la cipresoj de *Yldiz*, de la oazo de *Damas*, kiam la suno, subirante, falas supren la terasoj de *Salaye*.

Ĉi tiu konglomerato el brilaj kaj helaj ŝtonoj estas enkadrigata de verda freŝeco. Proksimen oni divenas la senfruktan grundon kvazaŭ dezerton. De unu flanko, ŝajne granita montaro ombra, griza, kiun oni nomas *Sierra obscura* (ombra aŭ malhela Montaro) starigas; de alia flanko, blankaj montoj afrikaspektaj unuprofilaj, ondigitaj terpecoj memorigantaj terajn zonojn, kalkstukitajn murojn de moskeoj kaj domoj arabaj. Funden, en la direkton de la multkava kurbo de la altanoj, oni vidas la belegan fluejon de la rivero majeste kvieta, kun ĝiaj

grandaj sablejoj kaj vastaj akvohaltoj, kiuj, pro la krepuska fajro, reflektas mirigantajn nuancojn... Oni rememoras ĉi tie samvalore la plej ravantajn lokojn samtempe delikatajn de Egiptujo kaj Alĝerio, la plej fantaziajn aspektojn de la lumlan-



Vidaĵo de uno el turoj de l' Pilar.

do; eble ilia simileco ne estas tiel pala, sed estas tiel miriganta kaj plej riĉa, plej varia, plej kolorgaja.

Kia grandioza aspekto tiu de ĉi loko!

(Daŭrigota)

PRI LA BILDOJ ZARAGOZO

Aperas la mirinda ĉefverko de la renesanca aragona stilo Komercaĵborso, de la XVI jarcento; vidaĵo de l' rivero Ebro, kupoloj kaj unu el turoj de l' *Pilar* (nuna katedralo); la riĉe plenarta posthorejo de *La Seo*, antikva mirinda Kate-

dralo, en kiu arto, historio, tradicio, politikaj okazintaĵoj, eksterordinare amasiĝas; fine, pejzaĝoj de l' Ebro, kvazaŭ spegulo viviganta animigas, per siaj ondoj sub lumo de l' suno kuŝiganta, la arbojn, la masivan konstruaĵon de l' Pilar kaj la tutan pejzaĝon.

AMU VIAN SIMILULON KIEL VIN MEM

Tiu ĉi dia ordono aperas en la «Biblio», en la «Korano», en la «Talmud», en la «Framasona Kodo», kaj certe en la sanktaj libroj de la ceteraj religioj, kaj ĉi tio elpruas ke la maksimumo estas *universala ordono* kaj ne ordono de determinata religio, Sed ĝi ne estas formulo pri supera amo; hodiaŭ, kiam la mondo travivas profundan krizon, kiu estas tagiĝo de nova Homaro, ankaŭ ĉi tiu formulo bezonas renoviĝon, almenaŭ por la homoj plej progresintaj.

Sur la lastaj paĝoj de la teozofia verko «La Spirito de la Naskiĝontoj», diras la verkintoj. ke estas du klasoj de amo: *persona* kaj *universala*. La unua estas limigata, ekskluziva kaj, pro tio, malperfekta elmontraĵo de l' Dia Amo, sed ĉe la nuna stato de la homa evoluado ĝi estas la lasta akiritaĵo de nia raso. Nepre necese estas ĝin perfektigi por trafi la universalan amon.

Por ĝin perfektigi, estas necese disvolvi ĝin sinsekve per la rememoro *pri la feliĉo* ĝuita kun la geamatoj, por tiel transformi la egoistan pasion laŭ sindonema amo, kaj per la kompato enkondukanta nin suferi ankaŭ la *malfeliĉojn* de la ceteraj. La persona amo al ĉiu el la similularo kaj la kompato al ĉiuj malfeliĉuloj estas leciono jam lernita de l' nuntempa homo por la *matura Homaro*, sed la *infaneco de la Superhomaro*, baldaŭ ektagiĝonte, sentos ne la personan amon sed la *universalan*, ne la amon disgutigitan sensignife al ĉiuj estaĵoj, sed *tutan amon* sentitan por ĉiuj estaĵoj.

Kaj la lemo de tiu nova Homaro ne estas «*amu vian similulon kiel vin mem*», sed «*amu vian similulon, ĉar li kaj ci estas unu mem*». La vorto «*kiel*» ankoraŭ esprimas kompaton, t. e., *apartigecon* kaj *konkuron*, kaj en la nova *Homaro* devos esti *unueco* kaj *kooperecon*. La triumfon de la nova lemo akcelos ankaŭ ESPERANTO.

Fernando Redondo.

MANIFESTO

KONTRAŬ KOMSKRIPCIO KAJ PORMILITA EDUKADO DE JUNULOJ

La Registaroj de la mondo nun oficiale allasas la superegajn pretendojn de la Paco. En la Pakto de Parizo ili malakceptis la Militon kiel rimedon de nacia po'itiko.

Tamen, preparado por milito daŭradas. Aparte elstara estas la kontrasto inter la Paco-deklaroj de Registaroj kaj la daŭrigado kaj plivastigado de militedukado.

Militedukado ekzistas en du formoj. En multaj landoj ĝi estas laŭleĝe devigebla. En aliaj landoj, kvankam nominale libervola, ĝi vere estas vaste devigata pro morala kaj ekonomia premado. Plue, ĉiuj Registaroj pretendas al rajto fine postuli militservon de ĉiu civitano sia, viro aŭ virino.

Ni urĝe deklaras ke jam venis la tempo kiam ĉiu sincera pacamanto devus postuli forigon de militedukado de junuloj, kaj malkonfesi la rajton de Registaroj postuli konskripcion. Konskripcio submetas la individuon tute submilita aŭtoritateco. Ĝi estas formo de la sklaveco. La kutima akcepto de tiu-ĉi sklaveco nur ilustras ĝian efikon nuligan.

Milita edukado estas instruo al menso kaj korpo pri la tekniko de mortigo. Ĝi estas edukado por militado. Ĝi estas la daŭrigado de la milittempa menso. Ĝi malhelpas kreskigadon de la volo al la paco. La plenaĝuloj faras gravan krimon kontraŭ la junaj, edukadante ilin en lernejoj, universitatoj, oficialaj kaj privataj organizaĵoj, ofte sub preteksto pri korpaj ekzerco, pri scienco de milito.

La Paco-interkonsentoj devigis ke la venkitaj landoj ĉesigu militedukadon de junuloj kaj konskripcion. Jam venis la tempo kiam la popoloj mem devus iniciati forigon de ambaŭ tra la tuta mondo.

Se Registaroj ne konstatas la profundecon de la ribelo kontraŭ milito, ili devas fronti la reziston de tiuj, por kiuj loĝaleco al la homaro kaj al la konscienco estas superega. La popoloj de ĉiuj landoj decidu:

NE PLU MILITARISMO

NE PLU KONSKRIPCIO

EDUKADO POR HUMANECO KAJ PACO

Ĉi manifeston subskribis multenombraj tutmondfamaj eminentuloj, el ili la jenaj:

Jane Adams, Upton Sinclair Profesoro D-ro John Dervey (Usono); Episkopa Moŝto de Birmingham, H. G. Wells H. W. Nevinston, Hon. Bertrand Russell. F. R. S. (Anglujo); Prof. D-ro. Albert Einstein, D-ro h. k. Thomas Mann, Prof. D-ro L. Quidde, Generalo D-ro h. k. F. von Schonaich (Germanujo); Rabindranath Tagore (iindujo); D-ro h. k. H. P. Berlage, Henriette Roland Holst (Belujo); Valentin Bulgakoff (Rusujo); Prof. D-ro Aŭgust Forel, Prof D-ro Leonhard Ragar (Svisujo), Toyohiko Kagawa (Japanujo); Victor Margueritte, Romain Rolland (Francujo); Stefan Zweig, Prof. D-ro Sigmund Freud (Aŭstrio); Selma Lagerlof, Elin Wagner (Svedujo); Prof. D-ro J. B. Kozák, Prof. D-ro Emanuel Radl (Ĉeĥoslovakujo); T. Z. Koo (Ĉinujo); Arvid Jarnefelt (Finlando); Amen Rihani (Arabio); k. c.

PRI LA VENONTA UNIVERSALA KONGRESO POR 1931

Alloga estas Krakovo, la malnova ĉefurbo pola en la pasinteco, pro kio la samideanoj devas kuraĝigi kaj sin decidi aliĝi al la Krakova Kongreso, kiu certe estos multenombre ĉeestata ĉar multe helpas la malalta valuto de la pola mono, kaj des pli helpas la granda diverseco de gentoj irontaj pro la multenombraj popoloj proksimaj je Polujo. Por la Hispanoj, kvankam malproksima la kongresloko, estas vere alloganta, ĉar proponas al ni belan kaj interesan vojaĝon tra Francujo, Svisujo, Aŭstrio, Hungarujo, Ĉeĥoslovakujo kaj Germanujo.

Krakovo staras en vasta ebenaĵo, kie la rivero *Rudawa* kunigas sian akvon al tiu de l' *Vistula*. Ĝi estis la ĉefurbo de Polujo, kaj ĝi estas plena je ĉarmoj, historiaĵoj kaj artaĵoj; tial ĝi estas vizitinda.

Sur la monto Wawel orienten kaj proksimen staras la kastelo, kiun starigis Kazimiro la Granda, je la XIV jarcento, sed el la primitiva konstruaĵo malmulte restas. Ĉiu pola reĝo aldonis konstruaĵon, pro kio ĝi prezentigas konstruaĵaro vidiganta

miksaĵon el kuriozaj konstruaĵoj malsamaj ĝenerale apartigitaj unu de alia kun la plej diversaj arĥitekturaj stiloj el ĉiuj epokoj.

La katedralon aŭ preĝejon de la kastelo ankaŭ konstruigis Kazimiro la Granda, kaj en ĝi kuŝas multenombraj polaj reĝoj kaj herooj interne de siaj pli-malpli riĉaj tomboj. En ĝi ankaŭ estas romana kriptotre interesa.

Krakovo havas multenombrajn preĝejojn, el kiuj estas citindaj Sankta Mario en la placo de la Komercio, el la XIII jarcento; Sankta Ano, en kiu vidiĝas la monumento al Koperniko; la preĝejo de l' Franciskanoj, kun monumento al la reĝo Ladislao Jagellon.

Citinda estas Pruntedona Institucio fondita je la XIV jarcento, kiu pruntedonas sen procento monon al malriĉuloj.

Oni fondis la Universitaton je 1364, dum regado de Jagellon, kaj ĝi posedas tre riĉan bibliotekon.

Modernaj promenejoj okupas la lokojn de la malnovaj fortikaĵoj.

Proksime staras monumento al Kociusko, la plej granda heroo de la pola sendependado. Apud la *Kasimierz* staras la *Krahusberg*, artifa monteto je la honoro de Krokus, fondinto de Krakovo, laŭ la tradicio. Proksime de la stacio, vidiĝas rimarkinda pordo konstruita je 1498 por defendi la urbon kontraŭ la Turkoj, kaj ĝi estas nomata *Florianerthor*.

La tradicio atribuas la fondon de la urbo al Krokus, kiun oni supozas princo de la *Granda Krobacio* fondinta la urbon je la jaro 700.

La primitiva kastelo sur la monto Wawel estis en tute el ligno, kiun detruis, same kiel la urbon, brulado, je 1125. Oni rekonstruis la urbon, sed ĝin redetruis la Tartaroj, je 1241.

Boleslao la Ĉasta donis al Krakovo privilegiojn, je 1257, sed ĝis la tempo de Kazimiro la Granda ĝi ne akiris gravecon, ĉar ĝi tiam fariĝis kortego, en kiu loĝis potencegaj riĉuloj, kiel ekzemple Wierzinek, kiu tagon festenis kun kvin reĝoj ĉe si.

Terura pesto, je 1360, mortigis 20000 loĝantojn.

Ladislao Jagellon finis konstrui la Universitaton je 1400.

Krakovo, je 1430 apartenis al la Ligo Hanseatika, kaj ĝi atingis la plej grandan prosperecon je la tempo de Segismundo la Maljuna; kaj je la regado de la filo de ĉi tiu, ĝi ekdekaden-

cis, kaj poste, fariĝinte Varsovio kortego, suferinte du svedajn invadojn je 1655-1702, kaj triumfinte la anarĥion, Krakovo terure dekadencis ĝis perdo da 100000 loĝantoj, ĉar dum la tempo de Estanislao Poniatowski ĝi havis 200000 loĝantojn.

En Krakovo oni kronis la polajn reĝojn ĝis 1764; ĝi estis ĉefurbo de Galitzio apartenante al Aŭstrio, prosperante iomete, sed la napoleonaj militoj multe malutilis al ĝi. La Kongreso de Vieno deklaris Krakovon kaj ĝian teritorion sendependa ŝtato, kaj la adicia traktato (3^{an} de majo de 1815) konstatis ĝiajn liberecon, sendependon kaj tutan neŭtralecon sub protekto de Aŭstrio, Prusujo kaj Rusujo; sed je 1846, pro interkonsento de la tri nacioj, ĝi estis kunigata al la aŭstria teritorio.

Hodiaŭ Krakovo, rehavinte Polujo sian sendependon, mirinde prosperas kaj staras unuavice kiel vizitinda pola urbo. Hispanoj, ni aliĝu al venonta KRAKOVA KONGRESO!

ANEKDOTO


Iun tagon, du kavaliroj vizitis la pentrejon de la tutmond-fama genia hispana pentristo Ribera, vidinte lajn verkojn kaj lin pentranta, tial ke ambaŭ kavaliroj sin dediĉadis al ĥemia studado kaj praktikado, ili parolis antaŭ la pentristo pri la *filozofa ŝtono*, kaj Ribera ekdiris:

—Mi trovis la *filozofan ŝtonon*.

—Ĉu vere? Kiel?—demandis la kavaliroj.

—Vi vidis la kielon—rediris la pentristo.


Trafe, mirinde, genie, dum unu horo li pentris belegan rimarkindan pentraĵon, nur kapon kun energiaj kaj esprimfortaj trajtoj, kaj ĝin fininte, li donis la verkon al servisto por ĝin alporti al inteligenta artkomercisto. Baldaŭ revenis la servisto, kiu donis saketon el oraj moneroj al Ribera kaj ĉi tiu, elŝutante sur tablon la orajn monerojn diris:—Jen kiel mi fabrikas oron; mia peniko estas la *filozofa ŝtono*.



ATENTU!

Ĉiuj membroj de H. E. A., kiuj helpas la publikigadon de ĉi gazeto per ĉiujara kotizo el 3 pesetoj, kaj kiuj ankoraŭ ne ĝin donis dum ĉi tiu jaro, bonvolu ĝin sendi al la Sekretario

de H. E. A., S-ro Mariano Mojado—Abascal, 13 Madrid—; same estas petataj bonvoluloj pretaj por subteni la gazeton, al kiuj ĉi tiu estos disdonanta iujn esperantajn verkojn dum la venonta jaro. Ĉiuj nericevintaj iun aŭ iujn numerojn de ĉi gazeto dum la kuranta jaro konigu al S-ro. Mojado la mankintajn n-rojn por tuja alsendo, kaj sciuj bone, ke ĵus aperinta ĉiu numero, ĉi tiun oni dissendas akurate al ĉiuj, pro kio la manko ne estas kaŭze de nia kulpo.



PRI NEŬTRALULOJ KAJ NENEŬTRALULOJ

Sur ĉi gazeto (n-ro, de Julio-Aŭgusto) aperis artikolo, bedaŭrante la agadon de iuj esperantistoj kontraŭ la neŭtrala esper-movado ĉu nacia, ĉu internacia; elpruvante ke la neŭtrala movado ne baras sed male helpas la progreson de kiu ajn neneŭtrala movado. Kaj la artikolo pritraktis la aferon absolute laŭ ĝenerala vidpunkto; sed, sendube, S-ro Vicente Moreno sin sentis ĉagrenata de la artikolo kaj celis frakasi ĝian argumentaron sin turnante al la laboristaj samideanoj per artikolo aperinta sur la ĉiusemajna gazeto «*Rebelión*», kiu aperigadas regule esper-fakon. Ĉi tiu artikolo de nia kompetenta samideano Moreno naskis malfermatan leteron mian, ĉar li min aludis; sed S-ro. Moreno, gvidanto de la aludita esper-fako, senkulpigante sin, konsideris ne esti eble aperigi sur «*Rebelión*» mian malfermatan leteron, pro kio li nur ĝin aludis, asertante ke la argumentoj *celas prui sed nur provas. Bona taktiko!* Inter ni tia taktiko estas mallaŭdinda, neakceptinda, ĉar ni volas havi nian propran opinion, konante la argumentojn, juĝante ilin kaj formante la opinion, ni ŝatas plej grandan liberecon: ke ĉiu formu sian propran opinion, per kono de la afero. Pro ĉi tio, jen mia malfermata letero al S-ro Moreno, por ke la samideanoj konsciu ĉu mi *celis prui kaj pruis efektive*:

«Estimata Samideano: Mi bedaŭras vian aludon sur «*Rebelión*», aljuĝante al mi patrecon de artikolo aperinta sur la lasta numero de Hispana-Esperanto. Mi konscias, ke via juneco kaj malgranda sperteco gvidis vin fari la aludon, ĉar alimaniere, se

tion vi estus farinta konscie, mi devus juĝi la aferon aliel pro la cirkonstancoj min ĉirkaŭantaj.

«La artikolo ne prezentas fundamentajn ideojn al vi por la laborista movado same, kiel ne ilin prezentas al katolika, oomota, bahaa, k. c., neneŭtralaj movadoj; de ĝenerala vidpunkto celas elpruvi, *ke la neŭtrala movado ne baras sed helpas ĉiajn neneŭtralajn movadojn kaj konsciigas, ke la neneŭtralaj same helpas nian kaj aliajn kiajn ajn.*

«Mallargá spirito estas tiu, kiu nur konscias esperanton «*ilo metita en manojn*» (el artikolo de S-ro Moreno), ĉar esperanto vere devas esti *sento enradikigita en korojn*; tial esperanto celas *Pacon kaj Amon*, kiuj ne povas ekzisti sen pli perfekta socioordo ol nuna, kaj por ĉi tio ĝin kreis la Majstro, kaj tial kaj tiel, esperanto ĉiam, ĉie, ĉiel, havas plenan efikon al la servo de la humiluloj, ĉar kiel diris mortinta Boirac, rektoro de la Universitato de Dijon (Francujo) «*Esperanto estas la latina lingvo de la Demokratio*». Via jeso pri la aserto de la verkinto konstatanta, ke dank' al neŭtraluloj kreigis partiaj movadoj, sufiĉas por pravigi argumenton pri komplementigo de unu kaj aliaj movadoj; kaj tiu, laŭ vi «*amuza*», pretendo pri enkonduko de esperanto en la lernejoj estas laŭdinda entrepeno, laborado progresanta iom post iom en ĉiuj nacioj, kiu estos tre utila al la popolamaso.

«Se ni, humiluloj kiel vi (la patro de S-ro Moreno estas mastro de fabriko por korkaĵoj), ne estus «*misuzantaj tempon kaj monon*» (laŭ diro de S-ro Moreno) por divastigi esperanton, kiu estus la stato de via movado? Vi «*konsentas*» ke dan al neŭtraluloj ekzistas neneŭtralaj movadoj; nu, ĉu ni «*senfru - te misuzis nian tempon kaj monon*»? Ĉu ni «*misuzas tempon kaj monon*» dissemante esperanton, por ke vi el tiu semo rikoltu abundan frukton? Ĉu ĉi tiu malŝparo de tempo kaj mono, havigante al vi forton, estas senfrukta? Ĉu vi devas kontraŭagi, mallaŭdi, moki ĝin? Ĉu vi nescias, ke la romantikuloj estis, estas kaj estos, ĉiam *enkondukantoj*?

«La aparteno al esper-movado dependas de la monrimedo, kaj neniu pretendis devigi iun ajn aliĝi al du movadoj; nek iu ajn el ni iam kontraŭagis la fondon de la Laborista Esper-Organizaĵo, tute male. Sed tute falsa estas la argumento via,

asertante ke laboristo apartenanta al la neŭtrala movado elspetas kontraŭ si mem.

«Kiu el ni apartenas, ĉar li havas monrimedojn por tio, al kiel eble plej multenombraj esper-movadoj, *ne al du, «metas diversajn kandelojn» sed al unu sola celo: triumfigi esperanton.*

«Ke vi kaj ceteraj kunuloj viaj sukcesu fondi vian celatan organizaĵon kaj daŭrigu elĉerpante forton el la laboro, kiun ni, *la misuzantoj de tempo kaj mono, la romantikuloj*, faras. Iru jam al Aspe (Alicante), kie ĵus romantikulo semis la grundon.

«Zamenhofe via».

Sed ankoraŭ mi aldonas: S-ro Moreno kaj liaj kunlaborantoj verŝajne, laŭ esprimas la esperanta fako de la aludita ĉiusemajna gazeto, ne trovas facile la vojon al tutlanda unuiĝo de la proletaj esperantistoj bedaŭrinde, ĉar oni volas doni al ĝi specialan tendencan «*karakteron mallarĝan*», pro kio S-ro Vicente Moreno finas artikolon pri ĉi tio dirante: «*Vivu la laborista esperantismo supertendenco!*» Li estas prava, la unuiĝo devas esti supertendenco, kaj poste ĉiu tendencemulo ariĝu al siaj samtendencaj samideanoj por agadi ĉe plej intima medio; kaj jen kiel la neŭtraluloj estas tiel pravaj, kiel S-ro Moreno, por kreskigi nian *supertendencan enlandan kaj tutmondan esperantismon, ne malhelpante, sed male, la fondon de ĉiaj tendencaj organizaĵoj*, kaj kiel ni, imitante S-ron Moreno, ekkrias ankaŭ: *Vivu la neŭtrala Esper-Movado!* Krom tio antaŭa, S-ro Moreno perfidas la celon de la ĉiusemajna gazeto «*Rebelión*», ĉar ĉi tiu celas suriri «komunan parton el vojo kun burĝoj, ĝis loko, kie nepre estos disiĝo», kaj S-ro Moreno ne volas suriri kun ni la ĉiam saman vojon de Esperanto, kiu nenie prezentas lokon por disiĝo, ĉar ĝi estas la «*Nova sento veninta en la Mondon*» faranta la homojn fratojn!

Lernu, lernu fari same, kiel faris kaj faras tiuj, kiuj «*misuzis tempon kaj monon*»; flankenlasu viajn diferencojn kaj starigu vian organizaĵon, kaj ĉiuj el vi, kiuj povas, suriru kun ni la vojon de la Majstro al komuna triumfo sen perdo de la apartaj idealoj personaj, por kiuj estas tutplena respekto.

Julio Mangada Rosenörn.

AL LA MEMBROJ DE HISPANA ESP-INSTITUTO

Laŭ diras la statutoj de H. E. I. estas necese renovigi la Komitaton aŭ reelekti ĝin ĉar de la Kongreso de Sevilla en ĉi daton pasis du jaroj.

Pro cirkonstancoj, kiujn ni bedaŭras profunde kaj sincere, ĉi jaro ne povis okazi Kongreso de Hisp. Esp-Asocio, kaj okaze de ĝi kunvenigi la plej grandan nombron el Institutanoj. Tial bonvolu esprimi per letero al la prezid. de la Instituto, S-ro Mariano Mojado, ĉu vi reelektas la nunan Komitaton aŭ, male, proponas alian.

Mi profitas ĉi okazon por sciigi, ke de la dato de la Kongreso de Oviedo, kiam vi unuanime aprobis la raporton kaj kalkulojn de nia Instituto, ĉi tiu daŭrigis seninterrompe sian prosperadon kaj efikan agadon, kvankam, de iuj lokoj oni apenaŭ atentis ĝian ekziston kaj efikon. Ĝi distribuis diplomojn elementajn kaj superajn al samideanoj de Madrid, Valencia, Gijón, Cádiz, Badajoz, Santander kaj Sevilla; ĝi pagis al Esperanto-Akademio la memvolan ĉiujaran kotizon, kiun H. E. A. disponis al la Akademio, kaj kiun la Instituto prenis sur sin por liberigi la kason de H. E. A. el tiu pago, kaj ĝi mone kaj materiale helpis kaj helpas H. E. A.'n, sed tamen la stato de ĝia kaso estas prospera kvankam ankoraŭ la trezorinto ne enspezis ĉiujn kotizojn kaj ĉiujn distribuitajn diplomojn. Ĝustatempe per raporto kaj prezentado de kalkuloj vi konstatos la ordan funkciadon kaj sukceson de H. E. I. same, kiel okazis kiam mi prezentis la raporton lastan en Oviedo kaj la trezoristo prezentis la kalkulojn, sed mi rimarkigas ke tute fidele je la ordonoj de la Regularo la Instituto liveras al H. E. A. grandajn servojn.

La Institutanoj, kiuj ankoraŭ ne sendis siajn kotizojn, estas petataj fari tion kiel eble plej baldaŭ, ĉar la jaro finiĝas; kaj ankaŭ ili estas petataj konscii, ke aneco al Instituto postulas anecon al H. E. A., pro kio estas necese esti paginta ankaŭ la kotizon al H. E. A.


Julio Mangada Rosenörn.

Sekretario de H. E. I.

PRI ALIA TRIUMFETO

Kiam oni aperigis la dokumenton pri oficiala profesoreco de S-ro Ponga el *Gijón* (Asturias), pro perdo de simila dokumento, oni ne povis publikigi la jenon:

«Profesia Lernejo por Komerco «Jovellanos» Gijón. La Vicsekretaria Moŝto, la 9^{an} de ĉi monato, diras al mi la jenon:



Posthorejo de La Seo (Antikva katedralo) Zaragoza.

«Konsciante la peticion al ĉi Ministerio, petante rajtigi la helpantan profesoron, S-ron Cristobal Fournier, de tiu lernejo, por klarigi esperanton en ĝi, dum la somera libertempo; ĉi Vicsekretarieco decidis favore konstatante ke la sperantostudado estu senpaga kaj sen akademia valoro.

«Tion mi komunikas al vi por via scio kaj sekvoj.—Dio vin gardu dum multaj jaroj.—Gijón 12 de Junio de 1930.—La Direktoro. E. Alemán.—Al S-ro Cristobal Fournier».

Estas bedaŭrinda la perdo de la dokumento, ĉar ĝustatempe oni ne povis diskonigi la oficialan decidon, kiun Esperanto trafis dank' al la efika interveno de H. E. A., kiu iom post iom rompas la barojn al oficiala enkonduko de Esperanto.

ENLANDA KRONIKO

Aspe (Alicante). Nia laborema kaj kompetentega samideano S-ro Fernando Redondo, Staba Subkolenelo, la 17^{an} de Aŭgusto ĵus pasinta faris paroladon pri Esperanto en la ĉefa teatro, forte impresante la publikan amason, kiu plenigis la teatron. Sekvo de la granda impresio estis malfermo de kurso ĉeestata jam de pli ol 30 personoj, kiuj, entuziasmigite de la praktika rekta metodo uzata de S-ro Redondo (kiun li praktikadas de la jaro 1912), de la simpleco de la lingvo kaj de la facileco de la lernado, fariĝis entuziasmaj propagandistoj.

Jaca (Huesca) Spite de nepreparo kaj subita malfermo de Esperanto-kurso en ĉi tiu somera Universitato, la impresio kaŭzita de la kurso estis granda, ĉar la multenombra enlanda kaj eksterlanda lernantaro ĉeestanta la Universitato konstatis, kiel per kvardek lecionoj oni akiras lingvon laŭ postuloj por ĝin paroli. Des pli la impresio estis efika, ĉar la Direktoro de la Universitato enplanigos esperanton en la oficialan programon, kaj ĉi Direktoro interesiĝis pri Esperanto, kaj por ĉi tiun utiligi al la utilo de la Universitato.

Ĉi tie disvolviĝados dum la longa vintro diversaj kursoj.

Gijón (Asturias). Dimanĉon 17^{an} de aŭgusto ĵusa okazis en la palaco de lia episkopa Moŝto solena akcepto al la samideanoj de Astura Esperanto-Asocio kiuj prezentis al lia episkopa Moŝto Johano Bautista Luis Pérez titolon de honora Prezidanto de la Asocio. La solenon ĉeestis ankaŭ lia episkopa Moŝto Francisco Frutos Valiente, episkopo de Salamanca kaj multenombraj personoj interesataj de Esperanto kaj kuriozemaj je nia afero. La Prezidanto de A. E. A., S-ro Francisco Menendez Rua paroladis prezentante la titolon kaj rimarkigante la laboron de la Asocio al la kultura agado de la Episkopo. Ĉi tiu dankas

la honorigon, konstatas la gravecon de Esperanto per kiu katalikoj el ĉiuj landoj kunvenas kaj interkompreniĝas, kaj laŭdas la laboron de A. E. A., esprimas korajn parolojn je la memoro de nia eminenta mortinto inĝeniero Ricardo Codorniu, unu el la fondintoj de H. E. A.

La episkopo de Salamanca ankaŭ laŭdegis Esperanton kaj rimarkigis sian malnovan amikecon kun S-roj Ricardo Codorniu kaj Vicente Inglada.

Tute solene, ĉe la festsalonego de la palaco estis metata la belege arta titolo, kaj fine sindoneme oni honoris la ĉeestantojn. En tute, grava solena okazintaĵo favora al Esperanto.

Sama de Langreo (Asturias). La 3^{an} de ĉi monato okazis la ĝenerala kunveno de la Astura Esperanto-Federacio, ĉeestata de delegitoj de ĉiuj aliĝintaj grupoj de la regiono: oni decidis ĉefe, interkonsente kun la esperanto-organizaĵoj de aliaj provincoj, organizi serion el paroladoj de S-ro Scherer (el Los Angeles California Usono) okaze de lia vojaĝo tra la mondo; gravigi la kunvenojn per propagando antaŭa kaj solenaĵoj, celante la ĉeeston de granda nombro da samideanoj. Oni bedaŭris la decidon de S-ro Antonio Jiménez Mora, kiu ekzigis de la Prezidenteco de la Federacio. S-ro Villa, el Gijón, atentigis pri necesaj ŝanĝoj en la regularo, komisiante ĉi S-ron por prezenti la amendojn aŭ ŝanĝojn al ĉiuj grupoj, por ĝenerala diskutado dum eksterordinara kunveno. Oni decidis okazigi la proksiman ĝeneralan kunvenon en Mieres.

La delegitoj de la grupoj voĉdonis por la Komitato la jenajn samideanojn: S-ron Luis García, Prez.; S-ro Emilio Peñarroya, Sekr. (reelektita), S-ron Alfredo Villa, Trez. (reelektita), la delegitojn de la grupoj, Voĉdonantoj.

Tute sekve oni fermis la esperantan ekspozicion kiun povis viziti la publiko, dum ok tagoj, en la Ateneo.

Oviedo. S-ro Jiménez Mora fondis «Sendependa Esperanta Grupo», kaj tial ke li ekzigis de posteno, kiel Voĉdonanto en la Provinca Komitato por Turismo, ĉi tiu Komitato nomis nian samideanon Luis García por tia posteno.

La «Sendependa Esperanta-Grupo» vigle laboras, kunvenante ĉiuvendrede en la Sociedad de Amigos del País. Je la komenco de Oktobro ĝi malfermos kurson.

La grupo «Verda Stelo» de l' Orfeon Ovetense honoris S-ron Luis García, konstanta protektanto de la grupo, per intima vespermanĝo okazinta la 6^a de ĉi monato kaj por doni al li pergamenan titolon de honora Prezidanto de la grupo.

La Sendependa Esperanta Grupo en la loĝejo de la aludita Societo de Amikoj de la Lando (Rosal, 7) malfermis tri kursojn: por infanoj, ĉiutage, de la 7^a vespere ĝis la 8^{1/2}; por junuloj, ĉiutage, de la 8^a vespere ĝis la 9^a; por perfektigi la konon de la lingvo, ĉiuvendre de la 8^a vespere ĝis la 9^a. Estas celo de la Grupo distribui premiojn al lernantoj

La Urbeŝtaro de Oviedo voĉdonis subvencion el 100 pesetoj por aĉetado de libroj al «Esperanta Grupo Oviedo» de la Ateneo.

Madrid. La movado en la socialista kampo pligraviĝas pli kaj pli. S-roj Moreno kaj Lerroux klarigas kvin kursojn, kiujn ĉeestas multenombraj lernantoj, kaj baldaŭ staros firma socialista esperanto-unuiĝo tutlanda.

La madridaj skoltoj ĵus fondis Grupon el entuziasmaj spertintoj pri la utilo de esperanto, kaj sufiĉe multenombraj skoltoj lernas la lingvon.

Krom malnovaj kursoj daŭrigataj en la tuta Hispanujo, novajn oni malfermis en Madrid, Badajoz, Cádiz, Ferrol, Gijón, Santander, Zaragoza, Logroño, Aguaron, Alicante, Fuentes de Nava, Almería, Las Palmas, Galdar kaj Aerodromo de Nador (Melilla)

En la grupejo de «Antaŭen» S-ro Vicente Inglada Ors faris esperantan paroladon pri sia vojaĝo al Stockholm kaŭze de sia partopreno en Internacia Geodesia Kongreso. Mirinde, flue, sprite kaj elokvente li klarigis siajn esperantajn impresojn kaj elpruvis ke dank' al Esperanto kaj al gastemeco kaj sindonemo de la stockholmaj samideanoj li ne trovis la grandajn malfacilaĵojn, kiuj suferigis liajn kongreskolegojn kaj ke tiel li povis vivi tute same kiel inter hispanoj.

Aspe (Alicante) La semado de nia samideano, S-ro Ferdinando Redondo donis jam frukton. Fondiĝis Grupo, kies prezidanto estas S-ro Argimiro Peñalva; trezoristo, S-ro Manuel Galván, kaj bibliot-sekretario, S-ro Pedro Miralles. Kurso daŭ-

radas kaj je januaro definitive jam funkciados la Grupo, kies ejo estas tiu de la skoltaj.

Elche (Alicante). Ta 21^{an} de Septembro, S-ro Ferdinando Redondo, ĉe kultura societo ĉi tiea faris impresigan propagand-paroladon pri Esperanto kaj Vegetarismo antaŭ multenombra ĉeestantaro, kiu tre interesiĝis pro la simpla kaj trafanta elokventa argumentado de la oratoro, kiu sciis veki atenton kaj intereson ĉies.

Barcelona — *El diversaj ĵurnaloj, de Barcelona, 15^a de Oktobro 1930:*

La organiza komitato, kiu estis elektita por establi en Barcelono la centrejon de Instituto por la propagando de Esperanto, kiu devas disponi je filioj en diversaj lokoj kun la celo intensigi la disvastigon de la idealoj de D-ro Zamenhof, komunikas al la interesatoj kaj simpatiantoj, ke ĝi estas finante siajn laborojn kaj ke kaldaŭ publikigos la adreson, kie ĝi devos instali sian oficejon, kiel ankaŭ la programon, kiu karakterizos la novan fondaĵon, iniciatita de la elementoj, kiuj antaŭ nelonge organizis en Barcelono la Kongreson de Esperantistoj de Katalunujo kaj Balearaj Insuloj, okazinta kun granda sukceso.

Sabadell. — *Grava literaturmuzika festo en Aplech esperanta grupo.*

Dimanĉon, la 12^{ande} Oktobro 1930, okazis en «Aplech» Esperanta Grupo. Montserrat, 9, 1^o, Sabadell, grava literaturmuzika festo por solenigi la inaŭguracion de praktika kaj elementa kursoj de Esperanto. La praktika kurso konsistas el la metoda diskutado kaj analizado en Esperanto, de interesaj aktualaj kaj instruaj temoj el la vivo kaj sciencoj, kaj estos gvidata de la profesoro Jozefo Anglada kaj de lia anstataŭanto la fervora samideano Anĝelo Valdepeñas, dum la elementan kurson gvidos kompetenta esperantisto el la grupo mem. Ĉeestis la feston ĉirkaŭ 200 personoj

Komencis la dirita vesperkunveno je la 6^a per malferma parolado de la Prezidanto de la Grupo S-ro Salvadoro Marcet, kiu klare vidigis la klopodojn de la Grupo por progresigi la Esperantan aferon. S-ro Montseny kantis «Niaj plej belaj okuloj»; F-ino Peñarroya deklamis «La Patria de mis sueños» (La patrujo de miaj revoj); S-ro Arteu kantis «Nia Lando» kaj «La

leyenda del beso»; S-ro Martí deklamis «L'Aiguat» kaj «A la joglaresa dels ulls llòbrecs» kaj ludis gitare komponaĵon; S-ro Vilaplana kantis «El pájaro azul» «La del Soto del Parral» kaj «La Dogaresa»; S-ro Artigas deklamis «L'Abracada» de Ignasi Iglesias kaj «Madrigal», de li mem. F-no Gispert legis propan verkaĵon «Les Flors»: S-ro Valdepeñas faris paroladon pri Esperanto kaj ĝia interna ideo kaj laŭdis la jam 25-jaran viglan agadon de la Grupo; S-ro Anglada faris trafajn rimarkojn pri la praktika kurso, kiun li estas gvidonta kaj fine S-ro Marcet fermis la feston. Akompanis plane la kantojn profesoro Jozefo Lladó. Ĉiuj partoprenintoj estis kore aplaŭdataj. Entute la festo lasis tre agrablan impreson en la animo de la ĉeestintoj. Bona nombro da lernantoj sin anoncis por ambaŭ kursoj.

DEL EXTRANJERO

EL ESPERANTO EN LAS ESCUELAS

La Dirección de las escuelas de Berlín ha dispuesto introducir la enseñanza del esperanto en 25 escuelas cuyos maestros están capacitados para enseñar la lengua. Los cursos, provisional o experimentalmente establecidos, han empezado ya y durarán hasta marzo de 1931.

EL ESPERANTO Y EL TURISMO

El III Congreso de Turismo de Sudamérica aprobó la proposición presentada al Congreso recomendando publicar en esperanto las guías y hojas de Turismo que hayan de hacer la propaganda fuera de la América hispana, y también introducir la enseñanza de la lengua en las escuelas de los países pertenecientes a la Federación Sudamericana de Turismo por ser el más fácil medio de intercomprensión de los pueblos. La proposición fué firmada por numerosos y eminentes congresistas.

En el mismo Congreso, a propuesta del ministro del Uruguay en el Brasil, Sr. D. Dionisio Ramos Monteiro y con una adición del Sr. Couto Fernández, se aprobó la edición de libros sintéticos sobre geografía, historia y economía, de todos los países de dicha Federación, en varias lenguas con inclusión del esperanto.



ISLA ESPERANTO Y CALLE DE ZAMENHOF

En Bulgaria, la Sociedad Esperantista de Rahov consiguió de la Municipalidad se de el nombre oficial «Esperanto» a la isla situada en el Danubio al Oriente de la ciudad, y el 10 de septiembre último la Sociedad fué puesta en posesión por 20

años de dicha isla (150-200 hectáreas) en virtud de contrato establecido con el Municipio, que autoriza la elevación de una torre metálica anunciadora, coronada por una gran estrella verde orlada con la palabra *esperanto*. La Sociedad se propone embellecer el paraje y disponerlo para el turismo dado el lugar que ocupa en una vía de extraordinario tráfico, realizando una gran propaganda práctica. Casos como éste, deben mover el ánimo de los samideanos y de los grupos a felicitar a las Instituciones que así se conducen.

En *Bratislava* (Checoslovaquia) la Municipalidad, en sesión de la Comisión para dar nombre a 280 nuevas calles, decidió dar el nombre de *Luis Lázaro Zamenhof* a una calle del VIII distrito, colocando las correspondientes placas con estas tres inscripciones:

ul Dr. L. Zamenhofa
Dr. L. Zamenhof-Gasse
Zamenhof L. Dr. utca.

WIEN KAJ NIEDEROSTERREICH

Sub ĉi tiu titolo ĵus eldonis la «*Komisiono por fremdulfrek-vento de la Liglandoj Wien kaj Niederösterreich*» (Malsupra-Austrio) 16 paĝan falditan gvidfolion kun bela titolbildo kaj 27 en la teksto troviĝantaj arte reproduktataj fotobildoj pri vidindaĵoj en Wien kaj Niederösterreich. La teksto entenas ekzaktajn informojn pri ĉio sciinda por vojaĝanto per fervojo aŭ aŭtomobilo, pri vivkostoj en Wien, pri potagaj programoj de l' vizitanto kaj pri la beliaĵoj de la ĉirkauaĵo, Ĉi tiu belega gvidfolio certe estas taŭga por allogi ties posedantojn al vizito de la ĉefurbo Wien kaj la lando Niederösterreich. Speciale niaj alilandaj samideanoj povas esti certaj, ke ili ĝuos ĉie en la rondo de esperantistoj la plej koran akcepton kaj gastamon.

La Esp. traduko el germana originalo, farita de reg. kons. H. Steiner, prez. kaj fondinto de IEMW. estas perfekta.

La gvidfolio estas ricevebla por alilandanoj pere de IEMW.

RECENZEJO

(Daŭrigo.)

Kohezio, kial ne pli mallonge (laŭ Kabe-Vortaro) *kohero*. (Ambaŭ, *fugi* kaj *kohezio* estas tute hispanaj). *Stafedo*, ĉu ne *stafeto* (SAT-Vortaro).

Gulaŝkanono, stranga kunmetaĵo plena je malbelo. *Deprema* (*de-prema*), ne komprenebla el siaj elementoj; estas pli trafe kaj *honeste* uzi novan radikon: *depriman SAT-Vortaro*, ol trompi per kunmetaĵo laŭ nacia kutimaĉo. Mi atentigu, ke tio *deprema* cetere estas tute komprenebla al ni hispanoj, sed mi abomenas mian nacian kutimaĉon mem, tial ni ignoru ĝin-aĉaĵon.

Furaĝo, laŭ ambaŭ cititaj vortaroj, nur signifas *nutraĵon por brutoj*, sed la tradukintaro nomis *furaĝo* tiun manĝaĵon de la soldatoj!

Misuzo de *portreto* laŭ senco de fot (ografaĵ) o. Erara apliko de *akurate* (paĝ 189 linio 7) en kazo *ne* rilata al tempo, anstataŭ la adekvataj *ĝuste*, *precize*, *ekzakte*. *Akurat'* nur rilatas tempon; bedaŭrinde multaj tion nescias aŭ ignoras.

Patroltaĉmento: tie troas balasta *taĉmento*, ĉar *patrolo* ja estas ia taĉmento.

Kelkaj aliaj vortoj, kiel *kvartiro* balastigas la novelon.

«*Preni direkton*» (naciaĵo) legeblas kelkfoje-tiom mallaŭdinda, kiom tiu eraro farita de multaj esperantistoj: «*preni tra-mon*». Sufiĉas, treetas «*sekvi direkton*».

Estas rimarkebla la malbeliga uzo de prepozicio *de* anstataŭ *el*; jen: «...en unu de ili...» (paĝ 102, linio 10), «...viroj de ni...» (paĝ 109 meze) k. t. p. Alia naciaĵo ne imitinda—malgraŭ tio, ke ĝi troviĝas en verkoj de la Majstro—estas anstataŭigi *iu'n* per *kiu*: «Ni volas vivi je *kiu* ajn prezo» (paĝ 121, linio 16).

«Havi ĉe si». Por eviti duoblan sencon, pli bone «havi kun si» (*kunhavi*, aŭkaŭ).

Oni troigis nacilingveman uzadon de *havi*: «*ekhavibatojn*», «*havi perdojn*». Ĉu ne preferinde «*eksuferi batojn*», «*suferi perdojn*»?

Tr troviĝas la laŭ uzo egalsignifaj «*de tempo al tempo*» kaj «*tiam kaj tiam*». La unua foriginda, ĉar ĝi estas mallogika naciaĵo: idiotismo; la dua, korekta, disvastiginda-enda

En paĝo 149, 6 alineo. «...ne sciante, kio ĉio povus okazi per tio...», anstataŭ ĝusta «ne sciante ĉion, kio povus...

La leganto estas supersutata per oftaj novaj vortoj, kaj tamen li rimarkas la eblecon plivariigi vortojn kelkloke tro ripetitajn: «*kiamaniere*», «*mallonge*»..., respektive anstataŭeblaj per *kiel*, *kiele*, *lakone*...

Tradukinto permesis al si la liberon unufoje uzi *ci* en plur-nombro: «*ci ĉiuj*», kio estas tute permesebla pro neceso, kaj cetere neniom danĝera.

En paĝo 9, linio 5 de malsupre, devus teksti «*kio faras por mi dek cigaredojn*», tamen mankas la subjekto *kio*.

«*Sed porciojn mi povas eldoni...*», tiu uzo de *eldoni* estas korekta, kaj mi rimarkigas pri ĝi nur cele atentigi pri tio, ke *eldoni* kaj *eldonejo* devas esti anstataŭigataj per *editi* kaj *editejo* de la verkistoj. *El-doni* tre rampe laŭas la germanan sensencaĵon *aus-geben*. *Eldoni*, do, nur havu la logikan signifon prenitatan el tiu ekzemplo.

Finaj vortoj: Tre malmultegaj preseraroj. Belaj papero, kovrilo kaj preso, kaj kio estas ĉefa: leginda verko pro ideoj, sagacaj psikologiaj observoj en granda abundo, kaj bona traduko el stila vidpunkto. L M S

* * *

«*Kaj ĉio restas penso sed ne faro*» de Lakshmiswar Sinha, 13 paĝa broŝuro, 13 × 19 cm., editita de Eldona Societo Esperanto en Stockholm. Priraktas la unuigon de la mondo ankoraŭ ne atingita laŭ diversaj vidpunktoj, por konkludi ke ankoraŭ oni ne atingis ĝin laŭ la morala senco, tio estas, ke ni ne atingis la interfratiĝon de la homoj, kiun ni kantas por kiu estas necese pli, ol diri, fari.—Ne bona uzado de prepozicioj, iu *iĝ* anstataŭ *iĝi*, iu hispana vorto kiel «*procedenco*», makulas la fluan lingvon de la teksto aliparte negrava, nenion novan diranta al ni.

* * *

«La junulino el Stormyr», de la fama Selma Lagerlof, premiita kun la premio Nobel, tradukita de O.Frode. Rakonto el ciklo «Fabelo», broŝurita, 94 paĝa, 14 × 20 cm., prezo:

1,50 kr. Bone presita. Tre interesa disvolvigado de mora'a rakonto en kiu ordonoj de pura konscienco triumfas, kaj alportas merititan feliĉon al dolorita fraŭlino grandanima. Flua simpla stilo alloganta; tamen mi rimarkis ne imperativon post *ke*, ekzemple en paĝ 24 «Ne decas ke mi malfruas». En la paĝo 28 «Si estis la plejeble *oportuna*», anstataŭ «Si estis la plejeble konvena». En la paĝo 30 «Mi ja volas vidi ŝin antaŭ ol mi *dungas* ŝin», «dungas» anstatataŭ *dungu* aŭ *dungos*; du «*ne*» en sama propozicio de la paĝo 75; «ke krom *ŝiaj* (anstataŭ *siaj*) eksterajo; ŝi havos...» en la paĝo 91, kaj io alia makuletas la tekston.

* * *

«Esperanto-Bretona Vortareto» bretone kaj esperanto, IIa libro de Int. Kelta Biblioteko, broŝuro 32 paka, $13\frac{1}{2} \times 19$ cm. estas sekvo de la I^a libro «Eksploro pri la situacio de la Bretona Lingvo»

* * *

«Roseroj», dua poemaro de Adalberto Smit, broŝuro enhavanta 60 poemojn, 64 paĝa, 11×15 cm. Prezo: 0,75 guldeno. N. V. Joh. Ykema's Uitg. Mij. *La Hago*. Nederlando.

* * *

«Jarlibro de U. E. A.» aperis proksimume kiel ĉiujare, kaj mi diras proksimume ĉar la modifoj aŭ ŝanĝoj ne estas gravaj; sed tute grava estas la libro por ĉiu kiu sin aljuĝu vera esperantisto ĉar ĝi liveras tre utilan peron por trafi per servo de U E A kiun ajn servon. Por havigi ĝin al si, aliĝu al la Universala Esp-Asocio. Genève. 1 rue de la Tour de l'Ile. Svisujo. aŭ pagu 5 sv. fr.

* * *

«La Fera Kalkanumo» angle verkita originale de Jack London, tradukita esperante Georgo Saville Bela granda volumo el 359 pagoj, $13\frac{1}{2} \times 20$ cm. Prezo 2,60 Reich Mark. Havebla ĉe Sennacieca Asocio Tutmonda, kiu ĝin editis, Colmstrasse, 1. Leipzig 0-27- Germanujo. Aĉetinda libro.